

# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

TRIMONATA REVUO jan.- mar. 1978

vol. 5, nro 9

S☆E☆L

SKOLTA ESPERANTO LIGO
Postbus 433
Zaandam Nederlando
Poŝtĝirkonto 54.36.47
*******

Fondinto "Avoto", A.W.Thomson.
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, D. H. Davis, L. J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11 Norvegujo. Tel. 02-283035.

Sekretario: J. K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam-1400 Nederlando. Tel.075-166931.

Kasisto kaj Administranto de "La Skolta Mondo": David H. Withey, 21. Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Tel. 051-928-2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach Bambleveien 2, 3700 Skien, Poŝtĝirkonto 8030413, Tel. 035-21848.

Membroj de la Centra Komibato:
Allan Fineberg, 76 Seventeenth Av., Paterson, NJ-07531, Usono.

Ŝindo-Seitaro, Nisi-mikuni 1-tyôme 200, Higasi-yodogawa -ku, Osaka-si, Japanujo.
******

La Skolta Mondo aperas kvarfoje en la jaro.

Okaze de nericevo, bonvolu informi la Nacian Reprezentanton aŭ la Administranton.

Kotizojn oni prefere pagu al la Nacia Reprezentanto. Se tia ne estas en la lando, prefere al la Kasisto!

# NOVA JARO

La nova jaro komenciĝis kaj donas al ni novajn esperon kaj taskojn. Persone mi tre ĝojas pro tio, ĉar la pasinta jaro multrilate estis por mi - kiel redaktoro de La Skolta Mondo - malesperiga jaro:
Anstataŭ elsendi kvar numerojn de la revuo, ni aperigis nur tri, el kiuj unu aperis kun intermiksitaj unua kaj lasta paĝoj, dum 2 numeroj aperis kun monatojn-longa malfruo.
Kaŭzis tion du faktoroj:
Mi mem transloĝiĝis
kaj samtempe ni transiris al nova presejo.
Nun tamen ni esperas, ke la "infanaj malsanoj" venkiĝis kaj la apera ritmo denove iĝos normala.
Kaj sciu: Mi penos fari mian plejbonon. Kaj mi fidas je la helpo de vi ĉiuj, tiel ke La Skolta Mondo povos fariĝi pli bona kaj interesa.

Feliĉan novjaron!

Haro.

Kovrila foto: Vulpidoj. Kun afabla permeso de la fotinto Oddmund Lunde, Bergen.

Redaktado finiĝis la 4an de februaro 1978.

# Novaj labortaskoj por SEL.

Karaj skoltamikoj kaj membroj de SEL!
Kiel vi scias, nia ĉeftasko en 1977 estis dissendado de la tradukitaj kaj presitaj libretoj VASTAJ HORIZONTOJ, kaj tiu laboro tre sukcesis, kion montras la rezulto:
Eldonkvanto 10.000 libretoj en 8 diferencaj lingvoj, el kio 2 ekzempleroj estas senditaj senpage al la ĉefskolto kaj la internacia komisaro en ĉiuj 110 landoj, kie ekzistas oficiala skolta movado.
Kaj pere de la akiritaj kontaktoj kun la Skoltaj Mondoficejoj en Ĝenevo kaj Londono SEL gajnis simpation, estimon kaj prestiĝon, kiuj estas tre ege valoraj kvalitoj por nia Ligo.
La kampanjo de SEL ankaŭ signifas, ke multaj skoltoj - - kaj precipe skoltestroj - - nun konatiĝis pri Esperanto, por kelkaj el ili por la unua fojo, kaj ili mem povis sperti, ke nia neŭtrala lingvo efike povos helpi ilin en ilia faka internacia laboro.

Do ni rajtas esti iomgrade gieraj pri tiu sukcesplena kampanjo - unuavice dank' al la energia laboro de nia ĝenerala sekretario KO (Hammer) - sed tamen tio ne signifas, ke ni nun povas ripozi, estante sen labortaskoj. Tute male, nun ni devas pliampleksigi niajn kontaktojn, daŭrigi la dissendon de niaj libretoj, serĉi novajn reprezentantojn kaj pligrandigi nian membraron.

Tial mi admonas al vi ĉiuj koncentriĝu pri jenaj labortaskoj en 1978/79

a. Laboro por vendi la presitan stokon de libretoj VASTAJ HORIZONTOJ al ordinaraj geskoltoj. Por akiri efikan vendon estas necese aperigi artikoletojn en skoltgazetoj naciaj pri la libreto (pri ĝia enhavo kaj celo, lingvoj uzitaj, mendoadreso, prezo k.t.p.). Por tiu agado ni bezonas la helpon ne nur de niaj N.R. kaj kunlaborantoj, sed ankaŭ helpon de unuopaj esperantistoj kaj skoltamikoj, kiuj komprenas la gravecon de la afero.
Pripensu, ke troviĝas diversspecaj skoltorganoj (multaj



B.P. kun kelkaj el la knaboj preparas kampludon dum la unua skoltkampo.
Rimarku la longajn bendojn de la ŝultroj, indikante la patrolon.

stencilitaj) en miloj post miloj (preskaŭ ĉiuj skoltgrupoj posedas tian), kiuj eble povos akcepti niajn artikoletojn pri la libreto. Samtempe menciu la lernolibron ĴAMBOREA LINGVO, kiu faciligas la lernadon de Esperanto por skoltoj.

b. Necesas ankaŭ informado ĝenerala pri SEL. Nur malmultaj skoltoj scias pri nia Ligo, kaj troviĝas skoltesperantistoj, kiuj ne estas membroj de SEL. Ni bezonas pli da membroj, - kaj por esti pli signifoplena organizaĵo, kaj por plibonigi nian financan situacion. Do helpu al nia Centra Komitato per varbado de novaj membroj. Nia jarkotizo ja estas tre malalta kaj LA SKOLTA MONDO venas aldone. Prezentu la aferon en skoltkunvenoj, parolante pri Esperanto kaj ĝia utileco por skoltoj, montru numerojn de LSM, Vastaj Horizontoj, Ĵamborea Lingvo, kaj eble flugfoliojn aŭ broŝurojn pri La Internacia Lingvo.

c. En multaj landoj ni ne havas ankoraŭ NACIAN REPREZENTANTON, aŭ ili malaperis pro diversaj kaŭzoj. Do ni devas plifortigi nian reton de NR, aŭ almenaŭ trovi perantojn, kiuj povos zorgi pri niaj aferoj. Centra Komitato daŭre laboras pri tiu flanko, kaj nun volas disvolvi niajn fortojn kaj serĉi novajn kontaktojn en novaj landoj, kie ni nuntempe ne estas reprezentataj. Sed ni petas niajn kunlaborantojn kaj la aliajn esperantistojn kunhelpi kaj sendi al ni sugestojn pri personoj pretaj ion fari por SEL. Efika laboro por SEL dependas de laboremaj kaj entuziasmaj homoj, kiuj interesiĝas pri la kombino ESPERANTISMO/SKOLTADO.

d. La kvara labortasko pri kiu mi opinias, ke ni devas koncentriĝi, estas preparlaboro por la venontjara ĵamboreo, la 15.a, en Irano en 1979. Tie partoprenos verŝajne inter 20.000 kaj 25.000 skoltoj el proksimume 100 landoj, kaj imagu la lingvan konfuzon kun proksimume 50 diversaj lingvoj! Centra Komitato ekkomencis agadplanon pri tiu grandega mondtendaro, kaj ni korespondas kun esperantistoj kaj skoltestroj pri la afero. Pripensante nian valoran dum Nordjamb-75, ni deziras kaj esperas pri simila sukceso en Irano, kie ĝuste nun regas tre forta intereso pri Esperanto, precipe inter la junularo.

Entute troviĝas sufiĉe da labortaskoj plenumendaj; dependas nur de ni mem, ke ni ĉiuj kunhelpos por ke nia Skolta Esperanto-Ligo estonte pligrandiĝu kaj fortiĝu.

Kun koraj novjarsalutoj al vi ĉiuj!

John Berggreen

# El la skolta mondo



Photo — courtesy Bord Failte

El IRLANDO raportas Frank DOBBS.

En Sud-Irlando estas 2 skoltorganizaĵoj kaj 2 skoltinorganizaĵoj - unu "malfermita" kaj unu katolika por ĉiu sekso. Ek de 1975 la Skolt-Asocio de Irlando, la "malfermita" asocio de kiu mi estas membro, komencis "komunuma skoltado"-kampanjon, kaj de tiam ĝi kreskis 25% ĉiujare. Dum la lasta jaro ĝi edukis 600 adoltajn estrojn. Kaj je novembro 1977 la 10.000-a skolto estis bonvenigita de la ĉefskolto, Commodore Tom McKenna. La foton de la gaja knabo vi vidos sur la lasta paĝo de la kovrilo de tiu ĉi n-ro

La skolt-movado komencis en Irlando en 1908, kaj Dublinaj kaj Belfastaj trupoj estis inter la unuaj en la mondo. De la 1.a ĝis la 10.a de aŭgusto ni festos la 70-an datrevenon per Internacia Ĵamboreo nomita WOODSTOCK 78, kaj 5000 skoltoj el la tuta mondo kampados tie apud la vilaĝo Inistioge, en graflando Kilkenny

Mi estas Frank Dobbs, 25-jaraĝa studento de medicino, kaj estro de Dublina skolt-grupo. Krom Esperanto kaj skoltado mi ankaŭ interesiĝas pri glisado ekde 1972. Tio estas flugado en senmotora aviadilo per utilado de aer-fluoj por supreniri.

Ferio en Irlando estas tre ĝua sperto. Krom kampado estas bonaj riveroj por kanotado kaj montoj por grimpado. La popolo loĝas maldense, kaj estas multe da bonaj sablaj strandoj ĉe la okcidenta marbordo.
Detalojn pri kampado, farmbienferioj, kanotado, glisado, skoltgrupoj k.c., mi povas sendi kontraŭ respondkuponoj.

Frank Dobbs, NR de SEL. Adreso 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.

El norvegujo kelkaj malgrandaj novaĵinformoj.


Laŭ propono de John Berggreen Norvega Esperantista Ligo en novembro 1977 decidis eldoni faldbroŝuron pri "Esperanto kaj la skoltoj" en la norvega lingvo.
La formato estos la sama kiel en la broŝuroj, kiuj jam ekzistas en diversaj lingvoj.
La eldonnombro de la nova broŝuro estas 2000.
Ankaŭ pli frue ekzistis tia broŝuro, sed ĝi elĉerpiĝis - kaj la informoj iom eldatiĝis

Post apero de artikolo pri Esperanto en la nova eldono de la "Skoltknaba Libro" kaj nova artikolo en la skoltina ĵurnalo, venas pli kaj pli da demandoj pri Esperanto al la skoltorganizaĵoj.
Tio pruvas, ke informado pri Esperanto estas necesa kaj tre utila - do imitinda ekzemplo por aliaj SEL-selcioj.

En Norvegujo oni nun iniciatis kunigon de la skoltknaba kaj la skoltknabina asocioj. Sed la skoltina asocio de Kristana Asocio de Gejunuloj restos ekster la unuiĝo.

# Ni parolas pri la

Jes - ni parolas pri la vetero. Preskaŭ ĉiam, kiam homoj renkontiĝas, oni konstatas, ke blovas, ke pluvas, aŭ ke la vetero estas brila. Kaj kiam la televido aŭ la radio havas siajn vetero-antaŭdirojn, ni aŭskultas atente. Sed kion oni faris en la tempoj antaŭ la radio?




Tiuj du viroj havas krurojn kiuj kurbiĝas, kiam pluvo venos. La kruroj estas faritaj el iu ligno, kiu facile suĉas malsekon.

En unu el miaj eksterlandovojaĝoj mi aĉetis, en Italujo, ŝtonan figuron de iu sanktulo. Mi havis ĝin sur mia tablo en pluraj jaroj, kaj ĝi mirigis multajn. Ĉar kontraste al la blanka ŝtono estis la surpentrita kolora vestaĵo: Bele blua en sunbrila vetero, sed ruĝiĝante kiam minacis pluva vetero.
Kial? Ĉar la koloro estis el kobalta klorido, kies kristalaj pingloj suĉas akvon kaj fariĝas ruĝaj, dum ili estas bluaj kiam sekaj.
Sed la plej ordinara profetilo tamen estis la veterdomo, el kiu elvenis helvestita sinjorino dum seka vetero, sed nigrevestita viro (kun ombrelo) dum la pluvo. Tiuj du figuroj estis fiksitaj per iu ŝnuro kiu tordiĝis pro influo de malseko. Similan efikon havas la du malgrandaj viroj, kiujn ni bildigas supre. Nur estas ĉi tie ne ŝnuro kiu faras la efikon, sed maldikan lignon en la kruroj. Tiuj do kurbiĝas pro malseko.
La saman principon "uzas" la elefanto, kies nazo estas farita el tia ligno, kaj pro tio montras al skalo kaj tiel indikas la sekecon de la aero.
Veterdomoj ktp estis faritaj jam antaŭ centjaroj, kaj fama fabrikanto de tiaj estis Jacob Leopold en Leipzig ĉirkaŭ la jaro 1720.
Alia strangaĵo el pli frua tempo estis la kamfora barometro. Ĝi konsistis el ordinara termometro kaj apuda glaso en kiu estis kamforo miksita kun salpetro kaj amoniako. La suba parto de tiu miksaĵo indikis la veteron. Des pli alte ĝi estis, des pli malbona vetero.





Amuza veterprofetilo (higrometro). La kapo de la elefanto estas fiksita per akvonsuĉa ligno, tiel ke ĝi sin movas.

Ŝnuro kiu tordiĝas pro la malsekeco ankaŭ estis la kaŭzo de la profetaĵoj de unu el la plej famaj veterprofetoj. Ĝi estis en la Urba Domo de la urbo Rothenburg en Bavario, kaj fakte estis lustro pendanta en ŝnuro el kanabo. Sur la lustro estis virina figuro, kiu do rigardis en unu direkton dum ŝi antaŭdiris sunbrilon, en alia kiam venos pluvo.
Sed ŝnuroj ne nur tordiĝas, ili ankaŭ longiĝas aŭ mallongiĝas pro la sekeco en la aero.
Tiun principon oni eluzis en la eble plej amuza el la veterprofetoj - la veteromonaĥon. Tiu monaĉo havas sian monaĥan vestaĵon kun la kapkovrilo, kiu estas parto de la vestaĵo mem. Sed la kapkovrilo estas ruze fiksita al la kapo de la figuro per tre maldika ŝnuro.
Kaj la efiko el tio estas, ke la monaĥo staras kun sia nuda kapo kaj ĝuas la belan veteron, sed se la vetero iĝas aĉa kaj malseka, la monaĥo sin kovras per tiu sia kapkovrilo. Kiam la vetero denove pliboniĝas, la monaĥo denove nudigas sian kapon, evidente sen helpo de homaj fingroj, kvankam li estas nur senviva figuro.
Pri iu speco de pizo oni havis la kredon, ke ĝi montras ne nur la veteron, sed ankaŭ scias antaŭdiri ion alian




Kamfora barometro

# VETERO



kiel ekzemple tertremoj aŭ eĉ akcidentoj kiel grandaj eksplodoj en la minejoj. Tion ĉion oni povus legi el la pozicio de la foliaro, kaj multaj havis tian planton sub vitra ujo en sia hejmo Esploroj tamen ne kredigis, ke tio sin bazas sur iu natura fenomeno, kaj oni rubrikas tion sub la nocio "superstiĉo".

Sed, kiel mi en la komenco rakontis pri mia "vetersanktulo", mi ankaŭ finas per similaj, eble pli oftaj figuroj.
La vetero-kameleonon, kiun ni bildigas malsupre, oni faris el paperaĵo, sur kiun oni pentris la ĥemikaĵon. Laŭ la rando oni do per ordinara koloro indikis la koloron de la kameleoni dum la malbona, interŝanĝema kaj bona vetertipoj.



La vetermonaĥo.

Kompreneble oni povis uzi tion ankaŭ en aliaj formoj, ekzemple kiel rozo.
Fine mi menciu la amuzan, sed tute nepraktikan azenobarometron, kiu indikas la veteron pere de la vosto. Kiam tiu vosto estas seka, la ve=tero estas seka, kiam ĝi estas malseka, pluvas, kiam ĝi sin movas, ja estas blova vetero, kaj la rapideco de la movado indikas la ventoforton. Se vi ne povas vidi la voston, estas nebulo. Kondiĉo tamen estas ke tiu azenbarometro pendas eksterdome!




# Ni ricevis:


inviton de Internacia Biblio-Misio, P.O.Box 133, Boronia 3155, Aŭstralio, partopreni perkorespondan Biblio-studkurson. La kurso estas tute senpaga, kaj se tio vin interesas, skribu al la supra adreso.

gazeteton kun la nomo Centra Bulteno.
En ĝi estas i.a. reprezaĵo de tute alia, kaj tute nova, revuo "Interfake", kiu laŭdire estas "Komuna Bulteno de ĉiuj Fakaj Asocioj" Ties unua numero aperis pro iniciato de s-ro Støp-Bowitz dum la kongreso en Rejkavik. Tiu nova gazeto iros al la "ministro de eksterlandaj aferoj" de ĉiu fakorganizaĵo, t.e. al homo speciale elektita por havi kunligan oficon. Ĉu ne estus ideo ankaŭ sendi ĝin al la redaktoroj - tiel ke la diversaj fakrevuoj povus citi kaj informi al la ordinaraj membroj?

# Dartoj

Ĉie vi trovas ilin - la malgrandajn tabulojn kaj la ĵetarkojn, kiuj donas al feriantoj - infanoj kaj plenkreskuloj - tiom da ĝojo. Sed plej ofte, almenaŭ en nia lando, oni ne konas la regulojn, kaj tial ne havas la plenan ĝojon de la ludo. En Anglujo - kie la ludo komenciĝis en la "pubs" - oni certe iom miras pri tio, sed fakto estas, ke malmultaj scias, ke tiu sporto nun disvastiĝas kiel internacia konkursa sportludo.

La tabulo
estas ronda kun diametro de 45.7 cm. En la centro estas punkto de 1 cm diametro, ekster ĝi 0,5 cm larĝan cirklon. La punkto donas 50 poentojn, la ekstera cirklo 25 poentojn je trafo. La venonta de interne estas 7,3 cm larĝa, kaj donas la poentojn indikitajn, dum trafo en la 0,9 cm larĝa peco donas la trioblon. La sekvanta 5,4 cm larĝa sekcio denove donas la indikitan, kaj la ekstera 0,9 cm larĝa strio donas la duoblon.




Distanco.
Oni staru en distanco de 2,44 m de la tabulo, kiu pendas 1,73 m super la planko. (T.e la centro de la tabulo!)

Ĵetoj.
Oni havas po tri dartojn. (Tiu ĉi vorto ne estas en la Plena Vortaro, sed devas esti la plej bona nomo de la ĵetiloj). Laŭorde oni ĵetas, kaj nur tiuj dartoj, kiuj tiel fiksiĝis al la tabulo, ke la ĵetinto mem povas ĝin eltiri , donas poentojn. Falinta darto, kiu falas inter la 2.44 m ĵetdistanco, estas konsiderata ĵetita, kaj ne donas poentojn.

La ludo.
Malnova regulo postulas, ke neniu poento validas, ĝis la ludanto trafis per unu darto en unu el la pecoj de la tabulo, kiu donas duoblan poentsumon. Nun, tamen, oni ofte ne observas tiun regulon pro la tempo. Aliflanke oni pro tio ofte komencas per pli alta cifero, de kiu oni atingu la nulon. Tiel oni ofte deiras de 501, anstataŭ la malnova cifero 301.
La poentojn atingitajn oni deprenas de tiu komencocifero, kaj oni devas atingi precize al nulo, kaj oni devas finiĝi per "duoblo"!
Se ludanto alvenas al unu aŭ al negativa cifero, oni ne kalkulas tiujn tri ĵetojn, sed en nova provo - post kiam la aliaj ĵetis, li denove startas ĉe la antaŭa sumo.
Necesas do kaj trafcerteco kaj planado!

La dartoj.
La ĵetiloj - la dartoj - estas el tri partoj: Unue akra pinglo, plej ofte ŝtala, poste la relative peza "korpo" el iu metalo, ligno aŭ plastiko. Se tiu ne estas metala, oni peziĝis ĝin per iu interna metalaĵo. Kaj fine la stirilo kiu origine estis farita el plumoj de la meleagro, sed nun ofte estas el plastikaĵo.
La ludo estas bazita sur memkontrolo kaj honesteco.

# jubileo

La plej fama norvega dramisto Henrik Ibsen (1828-1906) naskiĝis en Skien antaŭ 150 jaroj.
En Esperanto eldoniĝis pluraj el liaj dramoj, i.a. la ĉefverko "Peer Gynt" kaj la same fama "Brand" nun estas eldonota.
En La Skolta Mondo ni redonas kanton popularan en Norvegujo, esperante ke skoltoj povas lerni ĝin kaj kanti ĝin

Ni marŝas kun bonhumor',
pied' rapidas, ĝojas kor'.
Pli supren for de la valo,
malsupren al akvofalo,
konduku kien ajn la voj',
kantante marŝas ni kun ĝoj'.

En bela natur' de l' Di'
la vojon gaje iras ni,
jes, kvazaŭ montar-rivero,
senbare en freŝaero.
Kaj kiel birdoj en arbar'
jubilas nia gaja ar'.

Kuraĝo en nia kor'
kaj kantprovizo en memor'!
Ventegu sur mara ondo,
minacu la fulmotondro:
Trinkinte el arbara font'
salutas ni al fjord' kaj mont'.







La norvega poŝto honoras la memoron de la verkisto per tiuj du poŝtmarkoj, aperantaj la dekan de marto. La maldekstra montras la desegnaĵon de Per Krohg pri Peer Gynt, kiu rajdas sur boko, la dekstra la pentraĵon de Erik Werenskiold de la verkisto.
Ankaŭ al la centjara jubileo la poŝto eldonis memorserion, tiam kun kvar markoj.
Tiuj estis la unuaj poŝtmarkoj en Norvegujo sur kiuj estis portretita alia persono ol la reĝo.
En la jubilea jaro oni ludos plurajn el la dramoj, tiel en la teatroj, kiel en la TV.



# Skolta Esperanto Ligo

Se vi rigardas laliston de la Naciaj Reprezentantoj sur la antaŭlasta paĝo, vi tuj vidas kelkajn "truojn". Tiuj truoj montras la internan malforton de nia ligo en momento kiam la atento pri ĝi en la oficialaj rondoj estas pli granda ol iam. Certe - la truoj estas multe pli grandaj - ĉar forfalintajn landojn ni pli frue tute el- prenis, - kaj en multaj landoj ni neniam havis NR. Tio devas instigi al laboro - inter tiuj membroj de SEL kiuj loĝas en la konsiderataj landoj, kaj ne malpli inter la membroj de UEA en tiuj landoj!


Jen pri la opaj landoj:
Hans Brendel, Aŭstralio, devis ĉesi sian kunlaboron pro akcidento. Ni deziras al li baldaŭan resaniĝon, kaj dankas pro lia ĝisnuna laboro!
Gert van Damme, Belgujo, devis rezigni ĉar li ricevis alian, pli gravan kaj tial pli laborplenan oficon. Gratulon- kaj dankon!
Brazilio: Notu la novan adreson de s-ro Silva:
Caixa Postal 192, Acesita 35180

Charles Bardsley, Britujo, ek de 1920 estis nia NR, sed nun malsaniĝis. Koran dankon pro la senlaca, longedaŭra fidelo! La kasisto provizore transprenis la tsskojn.
Dennis Pease, Nov-Zelando nun havas novan adreson:
F2/14 Warborough Avenue, Epsom Auckland 3.

63a Universala Kongreso de Esperanto VARNA 1978

Al la 63a U.K. sin anoncis ĝis eliro de 1977 pli ol mil partoprenantoj.
Al fotokonkurso la fabriko Agfa-Gevaert donacis diversajn kameraojn, sonkasetojn kaj altfidelajn sonbendojn. Ekfotografu!

# fotokonkurso



Oni aranĝos la 14an internacian foto konkurson por skoltoj por la trofeo "La Ora Arko 1978".

1. La konkurso estas malfermita por junaj amatorfotistoj en 3 branĉoj: Nigra/blanka foto minimume 18x24 cm, kolora foto minimume 18x24 cm, kaj kolora diapozitivo. Temo: Skolta vivo kaj aktiveco.
2. Ĉiuj partoprenaĵoj devas alveni al Segretaria Premi Scouts, 38062 Arco, (Trento) Italujo, plej malfrue je la 25.a de aŭgusto 1978 kune kun kotizo de US$ 1 por ĉiu peco. Oni resendos la materialon nur se postulata.
3. La titolo devas troviĝi sur la malantaŭo de ĉiu foto, kune kun la nomo, preciza adreso, aĝo - kaj kun teĥnikaj informoj (kia kamero, filmo tempo ktp.
4. La juĝistoj elektos la bildojn montrotajn en la ekspozicio, kaj, en la 11a de septembro, oni elektos la gajninton de la trofeo "Arco d'oro 1978".
5. Oni aljuĝos specialan premion WWF, Sovaĝa Vivo de la Mondo, inter bildoj kun motivo el ekologio aŭ konservado



Fotografaĵoj el la konkurso estos uzataj en la revuoj de la Skolta Movado.

# N A C I A J   R E P R E Z E N T A N T O J

Aŭstralio:

Aŭstrio: f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden pr Vieno.
s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.

Belgujo: s-ro L.j. VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 10, B-2200 Borgerhout. Poŝtk.to Belga Skolta Esp.Sekretario 000-0327460-85. Telefono (031)3688.08.

Brazilio: s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, Av. Olegario Maciel, 274, Apto 1211 3000 Belo Horizonte, MG.

Britujo: s-ro **David H. W i t h e y , 21. Brookfield Ave Waterloo, Liverpool L 22 3ye,**

Danlando: s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.

Finnlando: s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen.

Francujo: s-ro Patrick Deveughele, 53 Av.de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne

Germanujo: s-ro Georg D. Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.

Hispanujo: s-ro S.Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tel 333 80 81.

Irlando: s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.

Italujo: s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona.Tel 045-525173.

Japanujo: s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.

Kanado: s-ro John H.F.Hoyle, Box 421, Forest Ont.
Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.

Maroko-Agadir:

Meksikio:

Nederlando: s-ro B.J.Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868. Poŝtkto 3335470

Norvegujo: s-ro H.A.Rosbach, Bamlbleveien 2, 3700 Skien. Tel 035 21848.

Novzelando: s-ro D.B. Pease, 6a Bay Road St Heliers, Aukland 5.

Peruo: s-ino J.de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4.

Portugalujo:

Svedujo: peranto s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, s-11233 Stockholm.

Usono: s-ro Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave, Paterson N.J. 07513.

Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.!): Kotizo inkl. abono:
Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned gld 3.30 aŭ egalvaloro.
Pliaĝuloj: Ned gld 5.00 aŭ egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned gld 5.00 aŭ egalvaloro.

Prefere pagu la kotizon al la kasisto. Vidu p. 2.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.

La skolto sur la apuda bildo povas certe fari fiere sian skoltan saluton:
Li estas Christopher Elliot el la skoltgrupo Co. Meath el Ashbourne,
kaj li estas skolto n-ro 10.000 de la Irlanda Asocio de skoltoj.
Gratulon!



Kaj samtempe dankon al s-ro Frank Dobbs kiu skribis al ni interesajn informojn pri la skolta vivo en Irlando.
Kiel alia momento en kombino kun la du grandaj insuloj ĉe la rando de Eŭropo, vi trovos en tiu ĉi numero la artikolon pri "dartoj".
Kiu sendos informojn pri sia lando venontfoje?




# LA SKOLTA MONDO

Limtempo por manuskriptoj kaj anoncoj:
1-a de Februaro, Majo, Aŭgusto kaj de Novembro.

REDAKCIO: BAMBLEV. 2 3700 SKIEN

NE ISSN 0037-6558